

Sennacieca Revuo n-ro 146 2018



Sennacieca
Asocio
Tutmonda



Supplément au n° 9-10 (1359-1360)
de Sennaciulo

ISSN 1248-2293

Sennacieca Revuo estas eldono de SAT

Asocia sidejo de SAT

67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: (+33) 09 53 50 99 58

kontakto@satesperanto.org

www.satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n-ro 1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064; BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s

Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo

Vic-prezidanto: Pedro Sanz

Sekretario: Diana Riŝar

Kasisto: Bruno Henry

Vic-kasisto kaj eldonestro: Guy Cavalier

Ceteraj membroj: Paz (Jung Hyunsoo), Dieter Rooke, Dominiko Simeone

Reprezentantoj de SAT en la LEA-Komitato: Paz kaj Dieter Rooke

Sennacieca Revuo

Redaktoskipa kunordiganto: Vinko Markovo

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'

Ceteraj redaktantoj: Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcelo

Redulez, José Maria Salguero (Kani), Pedro Sanz, Rikardo Schneller, Franciska Toubale

*Kontribuojn por ambaŭ gazetoj sendu
elektronike al*

sennaciulo.redaktejo@gmail.com

aŭ paperpoŝte al

SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent-Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

Imprimé par : TROIS A, 4 rue Théodule-Ribot, FR-75017 Paris.

Parution annuelle. *Aperas ĉiujare*. Le directeur de la publication : Guy Cavalier

Abonnement annuel — *Jara abono*: Francio 39 eŭroj

Autres pays — *Aliaj landoj*: vidu la detalojn en la kotiztabelo presita en *Sennaciulo*.

Dépôt légal à la date de parution : n-ro CPPAP 0515 G 86567

Suppl. au n° 9-10 (1359-1360) de *Sennaciulo*

Prezento

Kara leganto,

Jen la 146a numero de *Sennacieca Revuo*, kun novaj vestoj donacitaj de nova enpaĝiganto. Aldone al la redaktantoj listigitaj en la kolofono, la korektolaboron partoprenis ankaŭ kongresanoj el la 91a SAT-Kongreso en Kragujevac. Pluraj el la tekstoj ja utilis kiel ekzemploj dum trejnosesio pri la uzo de la redakteja laborspaco.

2018 estas memorjaro pri la fino de la unua mondmilito. La temon traktas eseo de Xavi Alcalde pri «La praktika internaciismo de Esperanto», kiu ebligas al vi antaŭgustumi la libron *Antaŭ unu jarcento*, kaze ke vi ne jam akiris ĝin. Unu el la gravaj mondproblemoj daŭre nesolvita post la unua mondmilito, kaj eĉ post la dua, estis la situacio de la koloniaj landoj, kiuj foje restis ekonomiaj kolonioj eĉ post la formala sendependiĝo. Tion memorigas la «Diskurso pri ŝuldo» de Thomas Sankara, en traduko de apudbordoza grupo, la Cenona Kvinopo. Pri la fontoj de nuna civitana milito en Sirio traktas Ĝemil Ksus, responde al mesaĝo en la listo «SAT-diskuto». La rilaton inter malsamaj niveloj de ekonomia disvolviĝo inter landoj kaj rezultaj ideologioj strebantaj, ĉu postkuri la antaŭulojn, ĉu atingi ilin per aparta loka vojo, traktas detale Nikolao Gudskov en sia eseo pri «Okcidentismo kaj slavismo». De mondpolitiko al demandoj pri la tuthomara vivmedio ni transiras pere de artikolo de Mir-Ko dediĉita al «La nuntempa amasa formorto de teraj vivaĵoj». Pli malpezan rigardon al kelkaj el la endanĝerigitaj donas Ĝemil Ksus en sia «Esperanta bestaro», kiu samokaze transirigas nin al la literatura parto de la revuo. Alitipajn strangnomajn bestojn, nome stilfiguroj, sinsekve pritraktas Rob Moerbeek antaŭ vidigi ilin al ni interagantaj ene de la satira poemo «Festeno» de Raymond Schwartz, iama prizorganto en *Sennacieca Revuo* de la rubriko «El mia ridpunkto». Al plukado de multe pli malnovaj sovaĝaj floroj, popolaj poemetoj el la 8a ĝis la 16a jarcento, gvidas nin Antonio Marco Botella en eseo pri «la originoj de la hispana liriko». Kompletige, freŝdatan teatron traktas Miguel Fernández en sia raporto pri prezento de «Bohemiaj lumoj» sur nuna madrida alternativa scenejo. Tekste, la ĉi-jaran numeron konkludas rakonto pri travivaĵoj de nederlanda SAT-ano, Sipke Stuit, en suda Francio dum 1930aj jaroj, en traduko de Roland Platteau.

Do denove, temas pri riĉa kolekto fontanta el plej diversaj cerboj kaj klavaroj. Ĝia tralego estu al vi agrabla kaj verko-instiga.

Vinko Markov

Kovrilpaĝa bildo

Teksto de Pedro Sanz
Fotomuntado de Joan Inglada

Ĉi-kovrile, jen nuntempa bildo de la loko, kie estis la unua koncentrejo (strando de Argelès-sur-Mer) trafita de la hispana rifuĝinto kaj esperantisto Jaume Grau Casas, kun aldonita valizeto, kien li enmetis kaj gardis siajn tekstojn.



Jaume Grau Casas

De 1939 ĝis 1944, Jaume Grau Casas verkis notojn en sia taglibro, kun la intenco postlasi spuron de sia restado en francaj koncentrejoj. Tie li estis arestita dum pli ol kvin jaroj.

Jaume alvenas Francien fine de terura vojaĝo, post longa fuĝo el la Franco'aj trupoj, sub la pafoj de la aer-armeoj nazia kaj itala faŝisma. Kiam li transiras la landlimon, li estis arestita unue en vagono, en la stacidomo de Cerbère. Li estis ĵetita sur la strandon de Argelès, kune kun centoj da miloj da rifuĝintoj venkitaj en sia milito, la Hispana Milito.

Nu, la rifuĝintoj troviĝas en situacio de administracia trompo, ili ne povas fari ion alian ol elteni la reĝimon de la koncentrejoj. Kiam Jaume alvenas al Francio, kune kun rivero da rifuĝintoj el la Hispana Milito, la francaj dekretoj-leĝoj de 1938 preskribas la starigon de tiuj novaj formoj de areo sena je rajtoj, la vastaj centroj de loĝigo de la tiel nomataj «nedezirindaj eksterlandanoj». La koncentrejoj por hispanoj estis la unuaj el longa serio da lokoj nove konceptitaj de la francaj aŭtoritatoj por respondi al la volo manipuli la fluojn da «nedezirindaj eksterlandanoj» ekde februaro 1939.

Vidu sur la lasta paĝo la poemon de Miguel Fernández *La unua koncentrejo*.

Pedro Sanz
surbaze de eltiraĵoj el la libro *Tagoj kaj ruinoj*.

La praktika internaciismo de Esperanto

Xavi Alcalde

La esperantistoj, kiuj venis el la tuta mondo kaj kiuj iris al Francio por partopreni la 10an Universalan Kongreson de Esperanto kiu devus okazi en Parizo, kaj kiuj tie devis ĉeesti la militan invadon kaj suferi la penadon kaj la mizeron de tiu tragika retiriĝo tra aŭtovojoj kaj fervojoj; tiuj kiuj iris al Francio por kanti pacismajn himnojn kaj kanonoj respondis al ni; (...) tiuj kiuj por ne rezigni niajn idealojn ni malfermiĝis en keloj senlumaj kaj senaeraj, ni nepre devas esti esperantistoj.

Josep Prat i Bonet^[1]

Komence de la 20-a jarcento, la naciisma ekspansio de la eŭropaj potencoj unuflanke kaj la neceso de internaciigo de la scienca esploro aliflanke, lokis la debaton pri monda helplingvo inter la ĉefaj temoj de la internacia agendo. Tiu debato ligiĝis kun la intelektaj dilemoj de la epoko, inkluzive de sciencaj kaj spiritaj temoj, nacia kaj etna identeco, la tiel nomata «juda problemo» kaj precipe la ebleco de paco en internaciaj rilatoj^[2].

Laŭ tiutempa sociologia esploro, sufiĉe komuna trajto de movado tiel diversa kaj plurala kiel la Esperanta estis ĝia pacisma esenco. Tiusence, ne estas troigo aserti ke, se ĝi okazintus, la monda kongreso de Parizo estintus la plej granda koncentrado de pacistoj de la tuta historio^[3]. Sed ekis la milito kaj la esperantistoj devis adaptiĝi al la nova situacio, disvolvigante diversajn funkciojn: inter aliaj, homama agado, agado en la gazetaro kaj agado pere de ilia partopreno en pacismaj organizoj.

Unue, ili informis pri la eventoj pere de siaj periodaj publikigaĵoj, ofte el pozicioj proksimaj al pacismo. Aparta okazo estis Internacia Bulteno, revuo naskita en novembro de 1914 por informi pri la milito el la oficiala vidpunkto de la germana registaro. Ĝia celo estis rezisti la anglan, francan kaj rusan propagandojn pri la krueleco de la germanoj, kaj ankaŭ kritiki la malbonan agadon de la kontraŭuloj. Dume, antaŭ la malfacilaĵoj trapasitaj de la Esperantaj revuoj en la plimulto de la landoj de la Triobla Entento kaj iliaj aliancanoj, la debato pri la neŭtraleco de la internacia lingvo okazis precipe en la paĝoj de *The British Esperantist*. Estis ankaŭ en tiu revuo kie Zamenhof eldonis sian faman *Alvokon al la Diplomatoj*, t.e. al tiuj destinitaj al rekonstruo de Eŭropo post la Granda Milito^[4].

Aliflanke, menciindas la homama agado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu tiumomente havis sian sidejon en la neŭtrala Svislando. Ekde Ĝenevo kaj dank' al la gvidado de Hector Hodler, ĝi sciigis novaĵojn de la esperantistoj prizonuloj en ambaŭ flankoj, kun novaj sekcioj en ĝia revuo kiel *Niaj mortintoj* kaj *Esperantistoj militkaptitoj*^[5]. En tiu rolo de peranto inter civitanoj de alfrontitaj landoj, la volontuloj de UEA – en kunlaborado kun Internacia Ruĝa Kruco – kolektis tage centojn da leteroj kaj alian privatan korespondadon pere de ĝia reto de lokaj reprezentantoj kaj sendis ilin al la konsignatuloj^[6]. Krome, ili helpis spuri homojn, disdoni manĝaĵojn, vestaĵojn kaj medicinaĵojn, kaj revenigi militkaptitojn al ilia patrio. Oni taksis, ke la totala nombro de tiaj servoj verŝajne superis 100 000 jare^[7].

Krom la Esperantaj asocioj, oni trovas multe da subtenantoj de la internacia lingvo inter la gvidantoj de la plej gravaj pacismaj tendencoj de la epoko: la scienca pacismo, la inisma pacismo, la religia pacismo kaj la proleta internaciismo. Rilate al la intelekta mondo, elstaras la Nobel-premiitoj pri paco Alfred H. Fried, kun-eldonisto kun Bertha von Suttner de la eldonaĵo *Die Waffen nieder!* («For la batalilojn!»); kaj Henri Lafontaine, kun-kreinto de la universala dekuma klasifiko kaj prezidanto de la Internacia Oficejo de la Paco (IPB, laŭ ĝiaj sigloj en la angla); la pentristo Félix Moscheles, bapto-filo de la muzikisto Felix Mendelssohn kaj prezidanto de la Internacia Asocio de Arbitracio kaj Paco; Gaston Moch, fervora subtenanto de Alfred Dreyfuss en la afero laŭ li nomita kaj prezidanto de la Internacia Instituto de Paco de Monako; aŭ la ĵurnalisto William T. Stead, ege aktiva en la Konferencoj de Paco de Hago, kiu pereis en la sinkado de la Titanic du jarojn antaŭ la komenco de la Granda Milito^[8].

Koncerne al la kontraŭmilita kaj pacisma inismo, menciindas ekzemple Sylvie Flammarion, gvidanto de la asocio Paco kaj Malarmado por Virinoj, kiu unuiĝis kun aliaj organizoj por krei en 1915 la Internacian Ligon de Virinoj por Paco kaj Libero (WILPF, laŭ ĝiaj sigloj en la angla). Alia homo substrekinda estas kvakerino Priscilla Peckover, ankaŭ ano de la IPB. Fakte, en tiu epoko, kaj la WILPF, kaj la IPB subtenis la uzadon de Esperanto por ilia korespondado kaj internaciaj kunvenoj. Pri la rilato inter inismo kaj esperantismo tiuepoke, Roberto Garvía jam emfazis la procenton (relative) altan de virinoj interesitaj en la internacia lingvo^[9].

El religia vidpunkto, la esperantismo de la epoko spegulis la universalisman mesaĝon de la lingvo, kun ideoj proksimaj al ekumenismo kaj al la interkonfesia dialogo. Temis pri antaŭtempaj proponoj, kiuj kontrastis kun la oficiala katolikismo. Tiusence, fundamenta elstarulo estis Émile Peltier, defendanto en la revuo *Espero Katolika* de tio kion post jardekoj teoriuloj kiel Joan Botam nomos makro-ekumenismon^[10]. Alia homo aktiva en la katolika ekumenismo, kaj sekve frontita al la eklezia hierarkio de la epoko estis la germana pastoro Josef Metzger. Pluraj estis la organizoj kiujn li fondis, kiel la Monda Ligo por Paco de la Blanka Kruco, internacia katolika societo kreita en 1916 kiu uzis Esperanton kiel laborlingvon. Poste, Metzger alfrontos la nazian reĝimon kaj finos siajn tagojn ekzekutita en 1944.

Esperanto havis ankaŭ fortan diskonigon en la movado de rifuzo al la militservo. Pro tio elstaraj subtenantoj de la monda helplingvo trapasis la militjarojn en malliberejo. Unu el ili estis la slovaka doktoro kaj verkisto Albert Ŝkarvan, sekvanto kaj amiko de unu el la ĉefaj referenculoj de la Esperanta pacismo: Lev Tolstoj. Pro sia kontraŭstaro al militservo, Ŝkarvan estis arestita plurfoje, la lastan fojon en 1915 restante en malliberejo ĝis la fino de la mondmilito. Tiumomente estis ankaŭ senigita je libero Fenner Brockway, estonta unua prezidanto de la Internacio de Militrifuzantoj (WRI, laŭ ĝiaj sigloj en la angla)^[11]. Fine, indas rimarkigi la proletan esperantismon kun ĝia plej konata gravulo, Eugène Adam, konata kiel Lanti. Temis pri radikala pacisto kun afineco al la anarkiisma movado, kiu lernis la internacian lingvon kiam partoprenante la militon en la trupoj de ambulancoj. Kaj estos alia anarkiisto, Ángel Pestaña, sekvanto de la kontraŭmilita pozicio de Errico Malatesta – jen alia simpatiulo de la Zamenhofa lingvo – kaj unu el la organizantoj de la Internacia Kongreso por Paco de 1915 de Ferrol (Galegio, nord-okcidenta Hispanio), kiu proponos en la kunteksto de la Tria Internacio, ke ĉiu delegito parolu sialingve estante nur tradukado al la monda helplingvo. Tiu propono ne sukcesos^[12].

La debato pri neŭtraleco kaj pacismo antaŭ la milito transiris tamen la proletan movadon. Tiel, multaj esperantistoj estis vokitaj militserve kaj multaj mortis en la milito^[13]. Inter tiuj

kiuj batalis oni trovas la jam menciitan Gaston Moch kaj ankaŭ unu el la ĉefaj katalunaj esperantistoj: Frederic Pujulà i Vallès, kiun la eko de la milito trovis kiel multaj aliaj en Parizo. Dum Pujulà batalis en la armeo, sia edzino, Germaine Rebours – sekretariino de la 5-a UK (Barcelono, 1909) – verkis en la revuo *El Poble Català* («La Kataluna Popolo») artikolojn kiel *La virino en la milito*, proponante la kreadon de servo de bapto-patrinaj dum milito, – simile al tiu kiu jam ekzistis en Francio –, kiuj devus okupi la lokon de tiu patrino, fratino aŭ amikino kiun la soldato malhavis en la fronto^[14].

Dume, la milito daŭradis kaj en aprilo de 1917 la Esperanta movado suferis neripareblan perdon kun la morto de Zamenhof, iniciatinto de la internacia lingvo. Afliktita pro la sekvoj de militema ŝanĝo-proceso kiu tuŝis lin ege proksime – kelkaj monatoj antaŭe sinmortigis lia pli juna frato Aleksandro^[15] –, li ne vivos por vidi kiel la plimulto de siaj posteuloj pereis en la ekstermejo de Treblinka. Tamen, ne ĉiuj novaĵoj estis malbonaj. Efektive, perforto skuas konsciencojn kaj de la cindroj de la detruo ŝprucas ankaŭ novaj projektoj.

Post la fino de la milito okazis en Bilthoven (Nederlando) aro de konferencoj fundamentaj por la estonto de la internacia pacismo^[16]. En ili kreiĝis tri institucioj kiuj ankoraŭ ekzistas hodiaŭ: la Kunularo por Repaciĝo (IFOR, pro ĝiaj sigloj en la angla), la Internacia Civila Servo kaj la jam citita Internacio de Militrifuzantoj. Origine, tiu lasta organizo nomiĝis esperantlingve Paco kaj daŭrigis la uzon de la internacia lingvo kiel unu el siaj laborlingvoj dum multaj jardekoj^[17].

Tiuperiode, la esperanta agado difiniĝis kiel praktika internaciismo, bazita sur sia homama dimensio. Ekzemple, esperantistoj de aŭstra regiono Stirio despere alvokis la samideanojn de aliaj landoj por ke ili akceptu provizore la infanojn kiuj suferis pro senhaveco en la rigoraj postmilitaj jaroj. Fine, tricent aŭstraj infanoj estis akceptitaj de hispanaj familioj kaj kelkaj el ili restis vivi porĉiame en Hispanio^[18].

Oni estimas, ke pli ol 35 milionoj da homoj pereis kiel sekvo de la milito, kiu ellasis ankaŭ fortan baton al universalismaj ideoj kiel tiuj de Esperanto. Poste, la intermilita periodo faciligos al la esperantismo novan prosperon kaj oficiale – memorindas la debatoj tiurilate ene de la Ligo de Nacioj^[19] –, kaj en la proleta movado. Sed tiu estas alia historio, kiu estos rakontata aliokaze.

Xavi Alcalde

Ĉi teksto aperis kadre de la verko *Antaŭ unu jarcento – La granda milito kaj Esperanto*, EFK-2018, paĝoj 333-340.

Notoj:

[1] Jozefo Prat i Bonet (1894-1936) estis kataluno kiu iĝis pioniro de la argentina Esperanta movado. En Argentino li estis ankaŭ gvidanto de la kataluna enmigrinta komunumo – li estis fondinta membro de la Orfeo Català («Kataluna Ĥor-societo») kaj ege aktiva en la Casal Català de Buenos Aires («Kataluna Societo de Bonaero»). Tie li estis ankaŭ konata sindikatisto. Vidu la artikolon de Prat, Patricia (2014). «Vaganta Hirundo. Omaĝaj vortoj honore de Josefo Prat i Bonet, pioniro de Esperanto en Argentino», *Almanako Lorenz* 2014. Rio de Janeiro, Brazilo. Paĝo 133.

[2] Rigora kaj ege dokumentita esploro kiu bone montras la gravecon de la socia movado subtenanta mondan helplingvon en la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento estas Garvía, Roberto (2015). *Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.

[3] Tiu aserto baziĝas sur tri premisoj: a) Unue, jam en la monda kongreso de 1913 en Berno la plimulto de la debatoj koncentriĝis sur la temoj de milito kaj paco. Vidu Künzli,

Andreas (2013). *La 9-a Universala Kongreso de Esperanto en Berno*. Vidu ankaŭ Van Dik, Ziko (2012). *Historio de UEA*. Vitazna, Slovakio: Espero; b) Due, la totala nombro de aliĝintoj en la UK de Parizo estis 3739, pli ol trioble ol en Berno; c) Fine, laŭ la datumoj kolektitaj en la tiutempa menciita esploro, almenaŭ 30% de la esperantistaro lernis la lingvon ĉar ili ligis ĝin al pacismaj valoroj. Vidu Reuben A. Tanquist (1927). *A Study of the Social Psychology of the Diffusion of Esperanto with Special Reference to the English Speaking Peoples*. M.A. thesis, University of Minnesota (Citita en Garvía 2015: capítulo 12). Vidu ankaŭ Rašić, Nikola (1994). *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio. La leganto interesita en komparo kun la nombro de partoprenantoj en la konferencoj por paco tiuperiode trovos multajn tiajn datumojn en Shenton, Herbert N. (1933). *Cosmopolitan conversation: the language problems of international conferences*. New York: Columbia University Press.

^[4] Vidu la ĉapitron de Javier Guerrero en *Antaŭ unu jarcento*.

^[5] La UEA fondiĝis en 1908 fare de Edmond Privat – kiu estiĝos bona amiko de Romain Rolland kaj de Gandhi – kaj Hector Hodler. Por detala analizo de la agado de Hector Hodler kiel UEA-gvidanto, vidu la ĉapitron 2 de Lins, Ulrich (2008). *Utila estas aliĝo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. Ankaŭ Künzli studis la rolon de Hodler kiel pacisma teoriulo. Vidu Künzli, Andreas (2013). *Milito kaj paco laŭ Hector Hodler*.

^[6] Menciindas, ke la Ruĝa Kruco disdonis tiuperiode milojn da ekzempleroj de pluraj eldonajoj en Esperanto. Inter ili, elstaras detala vortaro kun Esperanta traduko de la ĉefa sanitara terminaro en malsamaj lingvoj, pensita por tiuj, kiuj en tempo de milito devis doni aŭ ricevi helpon en ambulancoj kaj malsanulejoj. Vidu Lavarenne, Christian (2012). *Esperanto: Son idée interne dans ses origines et quelques-unes de ses expressions et manifestations (aide ou obstacle à la diffusion de la langue?)* Doktoriga tezo en historio. Universitato Parizo 13. Vidu ankaŭ Rodríguez, José María (1996), «The Esperantist Movement's humanitarian activities in the two World Wars and its relationship with the International Red Cross», *International Review of the Red Cross* 312, Paĝoj 315-322.

^[7] Jakob, Hans (1958). «La help-agado de UEA 1914-1918», *Esperanto* 51. Paĝoj 55-57 (citita en Lins (2008: Paĝo 66). Vidu ankaŭ Lins, Ulrich (2000). «The work of the Universal Esperanto Association for a more peaceful world». *Esperanto Documents* 45 A. Rotterdam: UEA. Paĝo 7. Simile, la kristana junulara asocio YMCA disdonis milojn da lernolibroj inter la militkaptitoj ambaŭflanke. Tiusence, vidu Privat, Edmond (1927). *Historio de la lingvo esperanto. Parto. 2 La movado 1900-1927*. Ferdinand Hirt & Sohn: Leipzig. Paĝoj 95-96. Efektive, la militjaroj estis periodo aparte trafa por la diskonigo de la internacia lingvo, ĉar tio ebligis, ke homoj malhavante komunan lingvon povis interkompreniĝi en malmulta tempo. Estis eĉ revuoj en Esperanto eldonitaj en malliberejo, kiel en Rennbahn, Germanio. Vidu Lavarenne (citita verko).

^[8] Aliaj pacismaj intelektuloj kaj samtempe subtenantoj de la internacia lingvo estis la Nobel-premiito de medicino Charles Richet, la Nobel-premiito de kemio Wilhelm Ostwald aŭ la psikiatro Auguste Forel. Tiuj tri kaj ankaŭ multaj de la menciitaj ekzemploj pri la scienca pacismo, la inisma pacismo kaj la religia pacismo, estas klarigitaj pli profunde en la ĉapitro 13 de Garvía (citita verko). Aliflanke, Hector Alòs en la enkonduko de *Catalan Esperantists: Pacifists in a Globalised World* (ICIP Working Papers 2012/03) enhavas aliajn elstarajn gravulojn, kiel Paul Berthelot, Jean Jaurès aŭ Julia Isbrücker. Tamen, estis eble Gaston Moch kiu plej laboris por plifortigi la ligan inter pacismo kaj esperantismo. Tiusence, legindas Bourrelie, Paul-Henri (2008). «Gaston Moch, polytechnicien combattant de la paix». *Annales des Mines – Réalités industrielles* 2008/3. Paĝoj 48-61.

[9] Efektive, kelkaj samtempuloj substrekis la «virinecan karakteron de la movado: pli emocia ol racia, kaj sen viraj valoroj, kiel patriotismo aŭ militismo» (Garvía, citita verko: Paĝo 97).

[10] «Ni kontentas, ke kaj socialistoj kaj hebreoj, protestantoj kaj masonistoj havas siajn [esperantistajn] revuojn. Ni iros preter tion. Ni malfermos nian revuon al ĉiuj. Se ni estas justaj, ni ne kredas ke ni havas la universalan veron, kaj ni pretas akcepti ke homoj kun religiaj ideoj kiuj estas malsamaj ol la niaj povas instrui al ni pri multaj aferoj» *Espero Katolika I* (1903), citita en Garvía (citita verko: Paĝo 190).

[11] Rakontas Brockway en sia membiografio ke, estante en reĝimo de izoliĝo, li nur rajtis havi ununuran libron samtempe. Interese, dum kelka tempo tiu libro estis eldono de la *Nova Testamento* en Esperanto. Vidu Brockway, Fenner (1977). *Towards Tomorrow: The Autobiography of Fenner Brockway*. Londono: Hart-Davis, MacGibbon. Paĝo 54. Aliflanke, ne malproksime de Anglio, alia esperantisto subtenanto de la militrifuzo estis murdita en la Paska Ribelo de 1916. Temis pri Francis Sheehy-Skeffington, amiko de James Joyce kaj sekvanto de la pacismaj kaj inismaj ideoj de T. W. Stead. Vidu Levenson, Leah (1983). *With Wooden Sword: a portrait of Francis Sheehy-Skeffington, militant pacifist*. Boston: Northeastern University Press. La rilato de tiu irlanda ĵurnalisto kun Esperanto, menciita de Leah (citita verko: Paĝo 13), konfirmis Christopher Fettes – disĉiplo de la politikisto kaj profesoro Owen Sheehy-Skeffington, filo de Francis – en persona komuniko kun la verkisto de tiu ĉapitro la 31-an de julio 2015 en Lillo, Francio.

[12] Vidu Del Barrio, Toño (2009). «Anarkiisto proponis Esperanton al la komunista internacio». *Sennaciulo* 05/06, n-ro 1247-1248. Aliflanke, esploro pri la rilato inter anarkiismo kaj monda helplingvo en Hispanio estas la ĉapitro 2 de Marín, Dolors (2010). *Anarquistas: un siglo de movimiento libertario en España*. Barcelono: Ariel.

[13] Ekzemplo estas Tivadar Soros – la patro de George Soros –, kiu rakontis siajn travivaĵojn en Siberio kiel militkaptito en *Modernaj Robinzonoj*. Novjorko: Mondial 1999 [1923]. Ankaŭ la hungara Julio Baghy verkis kelkajn el siaj ĉefaj tekstoj ĝuste dum siaj jaroj de kaptiteco en Siberio.

[14] Vidu la ĉapitron 6 de la tezo de Maria Marchese, «*Visca França, Visca Catalunya!*» *La Catalogna durante la Prima Guerra Mondiale: una prospettiva di genere*, Universitato de Napolo.

[15] Aleksandro Zamenhof forprenis sian vivon pro la teruraĵoj kaj la krueleco de la milito. Vidu Banet-Fornalowa, Zofia (2000). *La familio Zamenhof*. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro.

[16] Inter la plej aktivaj ĉeestantoj en tiuj konferencoj troviĝis la menciita Josef Metzger. Vidu Prasad, Devi (2005). *War is a Crime against Humanity: The story of War Resisters' International*. London: War Resisters' International. Paĝ. 89.

[17] Vidu Prasad, citita verko. Paĝoj 89, 95, 143 kaj 478.

[18] Vidu Cortès, Lurdes (2011). «Els nens austríacs acollits a Osona (1920-1923)», *AUSA*, XXV (167). Paĝoj 209-247.

[19] Vidu la raporton de la Asista Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj, Inazo Nitobe: *Esperanto and the Language Question at the League of Nations*, de 1921.